1971

5




*kvaronjara esprimilo de la*

*Junularo Esperantista de Nordameriko*




Sendube ne estas ĵurnalo en la mondo kiu ne almenaŭ menciis ke la Popola Respubliko de Ĉinujo nun estas parto de la Unuiĝintaj Nacioj kaj ke la Respubliko de Ĉinujo estas forigita. Post la ŝoko de la decido, multaj tre interesaj kaj tre gravaj demandoj sin prezentas, kiel mi penis esprimi per la supra bildo.

Kia estas la estonteco de la U. N.? Ĉu membreco en la U. N. ŝanĝos iel la Popolan Respublikon? Ĉu la fakto ke la U. N. forigis nekomunisman parton de lando kaj ricevis kiel membro la komunisman parton, instigos la komunismajn partojn de Koreo, Germanujo, aŭ Vjetnamujo peti membrecon? Ĉu la arabaj landoj, kiel kelkaj diras, petos la forigon de Israelo?

Kion _vi_ opinias? Kiujn rezultojn antaŭvidas _vi_? Skribu al _JEN-Bulteno_, kaj ni aperigos viajn opiniojn pri la demando: "Kien nun?"

Noto de la redaktoro:
Mi elkore dankas ĉiujn novajn kontribuantojn, kaj esperas ke tiuj kiuj ankoraŭ ne kontribuis al JEN-Bulteno faros tion en la estonteco.

## Memoraĵoj pri San Francisco

de Ken Meyer

Mi memoras la studentojn.

En San Francisco dum tri semajnojn ni per Esperanto lernis Esperanton, kaj pri Esperanto, kaj pri la Esperanto-movado. Sed ĉefe ni lernis pri niaj samideanoj.

Mi memoras matenmanĝon. La ĵurnaloj informis ke Prezidanto Nixon anoncis sian novan Ĉinujo-politikon, kaj mi tradukis lian anoncon en Esperanton por tiuj kiuj ne parolis la anglan. Eble mi lernis pli da Esperanto en la manĝejo ol en la klasejo.

Estis kvar klasoj ĉe San Francisco State Kolegio: du elementaj, unu mezgrada, kaj la alia altgrada. Magistro Auld instruis unu elementan kurson kaj la altan kurson, kaj profesoro Duncan Charters instruis la alian elementan kurson kaj la mezgradan kurson. En la meza klaso, ĉar estis Japaninoj kiuj parolis nur iomete la anglan, ni ĉefe parolis Esperanton. Sed kiam ni studis komplikajn gramatikajn aferojn, ni ofte devis paroli angle.

Laŭ mi, la meza kurso ne estis meza, sed alta gramatika kurso, kaj la kurso de D-ro Auld estis elementa literatura kurso. Magistro Auld ordonis ke la tuta altnivela kurso estu en Esperanto. Kiam mi aŭskultis la laŭtlegadon de Auld, mi trovis ke Esperanto povas esti dolĉasonora, poeziema lingvo. Bone estas, ke oni audas pli ol oni komprenas. Bone estas, se menso ekzercas kaj pligrandiĝas.

Tiu ĉi estis unu valoro de la kurso. La instruistoj kredis ke ni povas fari pli ol ni kredas. Tiel ni faris pli ol ni kredis esti eble. Eĉ pli valora ol la kurso estis kontakto kun la aliaj studentoj. Mi memoras diskutadojn pri la Esperanto-movado. Mi memoras babiladojn kaj kantadojn kiam ni devis paroli esperantlingve, ne krokodile. Tiam estis kiam ni lernis. La kursoj estis bonaj; la kursanoj estis bonegaj.

## Vegetara novaĵo...

Tutmonda Esperanta Vegetara Asocio re-organiziĝas kaj invitas aliĝon de Esperantistoj kiuj estas vegetaranoj au interesiĝas pri vegetarana vivmaniero. TEVA ankaŭ serĉas peranto[illegible] en Nord-Ameriko por la asocio kaj ties bulteno, Esperantista Vegetarano. Skribu al: Ernest Vana, DUDINCE okres Zvolen, Slovakio ĈSSR.

## ...kaj sciencula novaĵo

La usona peranto de la Internacia Scienca Asocio Esperantista estas S-ro Ken Thomson Ĉiuj membroj ricevas "Sciencan Revuon" kaj la bultenon de ISAE. La membrokotizo estas usona $3.[illegible] jare, aŭ usona $2.25 por studentoj. Enketojn kaj kotizopagadon oni sendu al: Internacia Scienca Asocio Esperantista, P.O. Box 663, Houston, Texas 77001, Usono.

Tedulo: Iu, kiu parolas kiam mi deziras, ke li aŭskultu.

# AM - PAĜO

Antaŭnelonge mi legis artikolon en la nova usona gazeto, Sexual Behaviour (Seksa Konduto) en kiu psikiatro D-ro Leon Salzman diskutas la problemon distingi ŝajnan amon de vera amo. La problemo kelkfoje tre komplikiĝas ĉar ŝajna amo, laŭ certaj kondiĉoj, povas iĝi vera amo. Kelkaj rimarkiĝoj sekvas.

La ŝajna amo estas supraĵa kaj egoista, dum la vera amo estas sufiĉe profunda kaj altruista. La ironio de la sajna amanto estas ke li tiom fantazias ke li ŝajnas esti pli sindonema ol la vera amanto. Li ne kapablas vere reciproki kun iu, sed preferas adori ŝin. Ofte li deziras pruvi ke li povas gajni la amon de iu, aŭ ke li povas ludi sian seksrolon. Ĉiam eblas ke la "amatino" ne deziras daŭrigi la interrilaton, aŭ, pli malbone, ke ŝi havas fortajn dubojn pri la tuta afero iam post la geedziĝo.

Necesas ke la gejunuloj agnosku ke voluptemo ofte ekzistas sen amo; ke ili reale taksu siajn interrilatojn, kaj ke ili estu honestaj inter si. Alie, ili suferos. Eble, kiam seksaj moroj iĝos pli liberalaj, la problemo pri ŝajna amo iĝos pli facile solvebla. Tamen la kerno de la afero ĉiam estos la honesteco.

de Thomas Goodman

Eks-ama fako

"Kial vi ne trinkas bieron?" "Unu nokton mi venis hejmen ebria, kaj mi vidis mian edzinon duope. Neniam plu!"

(el En Fru Majmateno "kelkaj perloj el la mezepoka nederlanda poezio". Kolektis kaj tradukis Wouter Pilger.)

(anonima, 14a jarcento)

Plej granda ĝuo estas am'
sur tero
De par' sampensa por ĉiam'
laŭ vero.
Ho Di', min helpu per prospero
al tiu cel'
kiun deziras en sincero
mi kun fidel'.

Kaptiĝis koro ame pro
virino.
Subul' de ŝi mi estu do
ĝis fino.
Sin vidi ŝajnas jam kulmino
super teraj';
pro si nur, fuĝas zorg-esprimo
de la vizaĝ'.

(Henric van Veldeke, ĉ. 1140-119(

Kiu domaĝas mian Damon,
De iu seka branĉo pendu,
Kie krimulaj vivoj finiĝas.
Sed kiu ne tuŝas mian amon,
La paradizo lin atendu--
Por li mi preĝas kaj kliniĝas.

Se iu demandas min
Kiel rekoni ŝin:
Ŝi estas tiu plej bela.
Kompatu, Damo, min;
Mi sunon donos vin.
Por mi brilu luno hela.

Se mian triston ŝi simpatias
Mi gagnos amon post doloroj
Kaj ĉian gojon post amaro,
Ĉar multajn karajn novaĵojn mi
scias:
En erikejo kreskas floroj,
La birdoj kantas en arbaro.

Ĉi tiuj gejunuloj deziras korespondi kun vi!

Michael Lennartz, 172 Ludwigsfelde, Eschenallee 45, Germana D. R.
15-jara lernanto, Lingvoj: germana, angla, rusa, Esperanto. Ŝatokupoj: radiotekniko, ŝakludado.

F-ino Elizbeta Turowiecka, Lodz, ul. Leglarska 13, Pollando.
19-jara junulino kiu interesiĝas pri ekonomiko, kantoj, dancoj, muziko, fotografado, aktoroj, geografio.

Peter Teleky, MISKOLC III, Kerstadion, ut. 13, Hungarujo.
16-jara junulo, deziras kor. kun similaĝa usona knabino.

Ubiraci de Holanda Cavalcante, Rua da Independencia 1346, Pau-dos-Ferros, R. N. Brazilo.
18-jara fraŭlo.

Maria de Fátina Costa, Rua dos Caicós, 1445 Alecrin 5900, Natal, R. N., Brazilo.
17-jara lernantino.

Bozena Szulc, Sosnoviec, Spokanja 22, Pollando.
18-jara lernantino.

Daniel Van Hoenacker; 91, rue de la Briqueterie, 59-RONCQ, Francujo.
20-jara fraulo deziras kor- kun 18-23-jara fraulino. Oficisto. Lernas la germanan lingvon. Interesiĝas pri muziko, literaturo, pentraĵo, kajakado, jogo.

Masanitsu Takada, 1-2764 Hagiyama, Kegashimurayama, Tokio 189, Japanujo.
29-jara elektroteknikisto. Deziras kor. pri ĉiuj temoj, precipe pri la E-movado kaj la milito en Vjetnamujo. Aliaj interesoj: legado, amatora radio, belartoj, montgrimpado.

speciala peto:
S-ro I. Prizerovski ("Jan") Cernigov, gl. Postamt, do Vostebovanija, IKRAJNIO, Sovetunio.
25-jara fraulo, studento de juro. Interesiĝas pri sportoj, moderna popolara muziko, vojaĝado. Gvidas E-kurson. Bezonas Esperantaĵojn ĉiuspecaj. Deziras interŝanĝi bildkartojn, diskojn, sondbendojn.

Homarkreska limigo

Mi deziras, se eble, iniciati diskuton pri radikala opinio pri la problemo de limig de la kresko de la homaro. Estas multe pli radikala ol nur prevento de koncipo, aŭ eĉ kombino de tio kun aborto.

Une, mi deziras emfazi ke la homaro estas biologie nu specio en la bestaro. La cefa apartiga karakterizoĵo de la speco estas la grandeco de la cerbo kaj la multe pli granda inteligenteco ol iu ajn alia bestospeco. Mi plue emfazas k ĉiuj reguloj de naturo egale efikas ĉe la homaro kiel ĉe ĉi aliaj bestospecioj. Ciuj regeneracias sin per unuigo de spe ĉelo kun ovoĉelo, ĉiu kiu hava nur la duono da nombro de kromosomoj en la normalaj korpoĉelaj de la bestospecio. Do, la fekundigita ovoĉelo havas la gustan nombron, sed la enhavat genoj multe diferenciĝas el ti de la gepatroj. Fakte, la eblecoj de malsameco estas tiom gr degaj ke multaj sciencistoj op nias ke neniu du homoj au bestoj iam ajn naskiĝas komple identaj unu al la alia, krom identaj gemeloj, kiuj fakte es nur du ekzemploj de la sama ho

Ĉar ili kreskas el la sama fekundigita ovoĉelo. Do, la samaj leĝoj efikas ĉe la homo kiel ĉe la aliaj bestoj, eĉ plantoj, rilate al la reproduktado kaj naskiĝo de idoj.

Ĉar la interŝanĝado de genoj dum koncipo estas tute hazarda, ekzistas multaj eblecoj de individuaj variaĵoj inter la idoj.

Estas tiel ke la specioj evoluadas. Variecoj kiuj rezultiĝas bonaj helpas al la individuoj vivi ĝis matureco, tiel ke eblos idoj kiuj eble posedos kelkajn el la samaj genoj. Malbonefikaj variecoj tendencos kontraŭ la individuo, tiel ke li eble ne vivos ĝis matureco, kaj ne havos idojn.

Sekve, unu el la fundamentaj naturleĝoj de reproduktado estas naskiĝo de granda nombro da idoj, kaj ke nur malmultaj el ili travivos ĝis matureco. La tendenco estos ke nur la plej fortaj, la plej inteligentaj, la plej ruzaj, lertaj, kaj eĉ bonŝancaj el ili maturiĝos kaj havos idojn. Kelkaj specoj de fiŝoj naskas milojn da idoj, el kiuj eble dek-kelkaj maturiĝos. Eĉ en la homa historio, ĝis lastaj jaroj, la meztipa familio enhavis multajn idojn, kaj la infana mortnombro estis alta.

Tamen, lastatempe preskaŭ ĉiu bebo kiu naskiĝas estas flegata ĝis matureco, senrespekte kiom malforta, malsaneca, aŭ misformata estu sia korpo aŭ menso. Ĉi tio estas definitive kontraŭ la leĝoj de naturo. El ĉi tio rezultiĝas tielnomata malaltiĝo de la genetika stoko de la tuta homaro. Estas la malo de la sekvoj de la ĝusta funkciado de reproduktado laŭ la naturaj leĝoj.

Mi opinias ke nura limigo de naskiĝoj ĉu pro kontraŭkoncipaj rimedoj, ĉu pro aborto, ne solvos la problemon laŭ naturleĝaj principoj. La homa speco bezonas altan naskiĝnombron kaj altan infanmortnombron, kiel bezonas ĉiu alia vivspecioj, kaj pro la samaj kialoj. Tamen, pro la inteligenteco de la homa specio, eblas elekti la infanojn kiu rajtas vivi ĝis matureco kaj tiujn kiuj havas sufiĉajn difektojn, ĉu korpaj, ĉu mensaj, ke ili ne taŭgos kiel vivdaŭraj anoj de la homaro. Oni povas bone fari tiajn deciojn dum kelkaj tagoj aŭ semanoj post naskiĝo, antaŭ ol la bebo ekhavos veran konscion, kaj la tuta afero ne estos multe pli malbone al la kutima aborto. La bebo mortos ĉiuokaze. Sed kontraŭe al la nuntempaj abortoj, kiuj okazas antaŭ ol iu ajn ekzamenô de la feto, se oni atendas ĝis post naskiĝo oni bone povas konstati ĉu la bebo estas sufiĉe sendifekta. Mi opinias ke ĉio ĉi tio estas multe pli bone ol aborto, kaj ke ni tiel agadus multe pli laŭ la normalaj naturaj leĝoj.

Kompreneble, ĉio ĉi tio rekte kontraŭas la dogmojn de multaj religioj. Kelkaj el ĉi tiuj dogmoj estas tiom vidkompreneble stultaj ke eĉ la koncernaj eklezianoj malobservas ilin.

Do, mi ĉi tiele prezentis mian sintenon al la demando. Mi multe ŝatos legi la reagojn de la legantoj de JEN-Bulteno.

S-ro John H. Fulton

(La redaktoro penos aperigi almenaŭ partojn el ĉiuj reagoj al ti ĉiu artikolo.)

Koloran faldfolion en Esperanto pri la urbo Orebro en Svedujo, vi ricevos senpage. Petu ĝin ĉe Turistbyran Storgatan 1, S-703 61 Orebro, SVEDUJO.

<u>La Universala Kongreso kaj la Internacia Junulara Kongreso</u>
de Gary Mickle

Ĉi-somere mi ĉeestis la UK (Universala Kongreso), la IJK (internacia Junulara Kongreso) en Edinburgo, kaj poste veturis al Gottingen, Germanujo, kiu mi partoprenas dum la jaro 1971-1972 la Eksterlandan Edukan Programon de la Universitato de Kalifornio. Ĝuste tiu cirkonstanco permesis al mi sperti unuafoje tiujn esperantistajn aranĝojn.

Dum miaj dek liberaj tagoj antaŭ la UK mi ĉefe nur rigardis la vidindaĵojn de Londono. Sed jam la duan tagon mi veturis al la ĉefoficejo de BEA en Holland Park, kiun oni facile atingas subterfervoje. Mi povis resti nur sufiĉe longe por ekzameni diversajn el la multegaj libroj kaj malnovaj revuoj en la biblioteko, kiu okpas unu mezgrandan cambron en la unua etaĝo. Dume oni faradis preparlaboron por la Kongreso en la granda teretaĝa ĉambro sube, kie mi aĉetis du laste aperintajn librojn. Unu vesperon mi ĉeestis kun Ges-roj Schulze (kiuj prizorgas la okcidentan Inform-Servon), ankaŭ frue venintaj, kunvenon de la Londona Esperanto-Klubo, kie oni faris kongresajn planojn. En la tagoj antaŭ la Kongreso aperis en la stacioj de la subterfervojo bonvenigaj verdaj-blankaj afiŝoj en Esperanto, bone videblaj inter la multnombraj reklamafiŝoj.

La unua tago de la Kongreso, 31 Julio, mi portis miajn valizojn al mia ĉambro en studenta loĝejo kelkjn domblokojn de la Kongresejo. Ne utilas priskribi multajn unuopajn aranĝojn, pri kiuj vi povas legi aliloke. Mi volas nur ripeti tion, kion oni jam ofte diris: ke la UK estas unika internacia manifestacio pri la vivanteco de nia lingvo. Tiu eble jam banala rimarkigo fariĝis por mi viva sperto precipe ĉe la kunvenoj de la Komitato de UEA, kiu vigle funkciis kvazau malgranda parlamento, tute ne ŝajnanta grupo de kunvenintaj diverslingvanoj. Tie oni energie diskutis kaj debatis la aktualan situacion de UEA kaj la movado, kaj ankau--objektive necesas ĝin diri--akre disputis kaj kverlis kelkfoje. Tio atingis kulminon unu vesperon kiam oni trovis necese elĵeti nin spektantojn el la salono por tiel okazigi sekretan kunsidon. Kelkaj disputoj karakterizis la Kongreson, ekz., tiu de la Unua Generala Kunveno inter prezidento Lapenna kaj S-ro Figheria, kies edzino redaktas <u>Heroldo'n</u>, rilata i.a. al la financoj de UEA kaj la redakcia politiko de <u>Heroldo</u>. Ankau inter UEA kaj TEJO montriĝis streĉaj rilatoj. Sed ne konvenas dediĉi tro da atento nur al tiu flanko de la Kongreso. Okazis imponaj kulturaj kaj distraj programoj. Unu plej interesa ero la Dua Generala Kunveno, la forumo pri lingva komunikado en la nuntempa mondo,

fakte debato inter s-ro MacMillan, kiu reprezentis la British Council, organizaĵo strebanta pri disvastigo de la angla, kaj d-ro Lapenna. La intereso ĉe la kongresanaro pri diversaj aranĝoj estis tiel granda, ke plurfoje la salonoj montriĝis ne sufiĉe grandaj, la sola malglataĵo en cetere tre bone organizita kongreso.

La UK finiĝis sabaton, 7 Aŭgusto, kaj tiuvespere granda parto el ĝiaj junaj ĉeestantoj kolektiĝis ĉe aŭtobusejo, de kiu ni ekiris en du autobusoj al la IJK en Edinburgo. Survoje ni iom kantis kaj dormis laŭpove. Ni alvenis la kongresejon ĉirkaŭ la 7:30 matene, iom antau la matenmanĝo. La kongresejo estis studenta loĝejo en la urbomezo. Tie ni disponis plurajn komfortajn salonojn por kunvenoj kaj programoj, kaj en la manĝejo ni ricevis tri manĝojn ĉiutage. Multaj el ni loĝis en la koncerna loĝejo mem--mi kunloĝis en komforta ĉambro kun germano kaj japano--kaj aliaj estis loĝigitaj en proksimaj studentaj loĝejoj.

La programo de la kongreso enhavis erojn kaj seriozajn kaj distrajn. Mallonge post la komenco de la kongreso oni formis diskutgrupojn, kiuj dum kvar kunsidoj diskutis diversaspekte la temon de la 26-a IJK, "Junularo kaj Kulturo," surbaze de de prelego farita komence de ĉiu kunsido. Cetere kunsidis kvarfoje la TEJO-Komitato, dufoje la Estraro, kaj unufoje okazis Generala Kunveno. Distraj eroj estis la Interkona Vespero, la Viskia Vespero, la Festvespero ("Ceilidh") kaj la Balo, ĉe kiuj oni vigle kantis kaj kelkfoje iom malmodere drinkis. La trian tagon de la kongreso ni faris per aŭtobuso tuttagan ekskurson ekster Edinburgo tra la pitoreska kamparo de Skotlando al la Lago Katrine, norde de Glasgovo.

Ci tiu Kongreso havis esence malsaman etoson ol tiun de la UK, pli intiman, grandparte pro la pli malmultnombra partoprenantaro atinganta Edinburgon, Proksimume 150.

Post la IJK ni reiris al Londono, kie ni restis kelkajn tagojn antau ol flugi al Germanujo. Jam finiĝis la du kongresoj, sed ne miaj esperantistaj travivaĵoj; kiel mi subite trovis ĉe la fama Hyed Park Corner, kie inter diversaj propagandistoj kaj originaluloj, ekzemple du afrikanoj, kiuj malŝatas britojn (pigraj-- tutan tagon trinkas teon) kaj usonanoj (ekcitigemaj, kolerigemaj), hindo, kiu malamas pakistanojn kaj islananojn generale, diversaj politikuloj kaj religiuloj, inkluzive Jesuo mem (reenkarniĝinta), troviĝis, je mia miro, maljuna esperantistomondfederalisto, kiu varbis por ambaŭ ideoj al la skeptika publiko.

Nun mi trovas min en Gottingen, Germanujo, kaj klopodas plulerni kiom bezone la germanan lingvon por pasigi jaron ĉi tie. Se iu deziras skribi al mi pri io ajn, jen mia adreso:

34 Gottingen
4-6 Stauffenbergring, Alfred-Delp-Haus
Okc. Germanujo.

Pri la VENONTA Universala Kongreso

JEN serĉas gekontribuontojn al speciala eldonaĵo por la Portlanda UK. Ĉu vi ŝatus verki originalan humoraĵon aŭ bildstrion, traduki usonan humoraĵon, verki artikolon pri usona slango aŭ dialekto kiel "Pennsylvania Dutch"? Kontaktu la redaktoron.

## Lingvo kiel malkomunikilo

En antaŭnelonga rubriko de D-ro S. I. Hayakawa, li priparolis la uzon de fivortoj, precipe de la plej malbelaj el ili, kiel malkomunikiloj.

Diskutante la aferon de Kent State Universitato, li asertis ke la filingvaĵo uzita de kelkaj el la gestaudantoj kontribuis al la granda streciteco de emocioj kiu okazis tiam, kaj kiu kontribuis al la tragedia rezulto de la afero.

Fivortoj kiujn oni uzas por parole ataki alian personon ne estas veraj komunikiloj, laŭ D-ro Hayakawa. Ili paralizas la racieecon de la persono al kiu oni ilin diras, kaj eĉ de la diranto mem. Pro tio ke atakaj fivortoj estas malakcepto de la racieco de alia persono, ili estas samtempe malkcepto de lia homeco. Do, tiuj vortoj ne estas komunikiloj, sed malkomunikiloj.

Ni, kiuj vivas kaj komunikas dum la epoko de la "liberigita parol-maniero" devus nepre atenti pri tiu ĉi afero: Lasante en la pasinteco la severmorulan bridadon de esprimo, ĉu ni povas ankau eviti la senhomecigon, kiun kauzas la atakaj fivortoj?

## El letero

La redaktoro ricevis afablan leteron de Roan Orloff Stone, konata usona Esperantistino, en kiu ŝi menciis, interalie, la du jenajn aferojn:

Rilate la la Portland Kongreso, ŝi havas la taskon organizi tut-Indianan programon por la Post-Kongreso en San Francisco. Ĉu iu havas sugestojn au kontaktojn ĉi-rilate?

Ŝi petas ke tiuj JEN-anoj kiuj estas Bahaanoj, bonvolu sendi sian nomon kaj adreson al ŝi. La Mano de la Kredo de Dio, D-ro Adelbert Muhlsclegel en Svislando, petis, ke ŝi starigu liston de ĉiuj Bahaanoj tra la mondo, kiuj estas Esperantistoj.

Antaŭdankon pro via kunlaboro!

## Ŝtupvortoj

Ŝanĝante nur unu literon kiam vi iras de unu vorto al la sekvanta, vi povos ŝanĝi kokon al luno, kaj katon al muso!

K O K O

_ _ _ _ : bongustaĵo el faruno.

_ _ _ _ : likvaĵo el frukto.

_ _ _ _ : nia planedo cirkauiras ĝin.

L U N O

* * *

K A T O

_ _ _ _ : tero plus akvo.

_ _ _ _ : oni plantas florojn en ĝi.

_ _ _ _ : ĝi estas parto de via pantalono.

_ _ _ _ : malo de tiro.

_ _ _ _ : malsanporta insekto.

M U S O

Sendu vian solvon al la redaktoro.

adreson?

## Parolu al la mondo per amatora radio

de Craig Koukol

Esperanto rompas lingvo-barojn, sed ne lasu ke distanco-barojn ĝenu vin. Partoprenu tiun mirindan flank-okupon, amatora radio, kaj vi povos paroli el via propra hejmo kun homoj de la tuta mondo.

Estas nun pli ol 490,000 radio-amatoroj tra la mondo, estante preskaŭ 300,000 nur en Usono. Mi estas parolinta persone kun amatoroj en Nov-Gvineo, Paragvajo, Norvegujo, kaj 260 mejloj de la Norda Poluso! La radio-flankokupo estas bonega maniero iniciati amikecon tra la mondo kaj havi multe da plezuro samtempe.


Multaj Esperantisitoj estas radio-amatoroj, kaj ili uzas la Interlingvon en radio-retaj diskutoj.

La Federal Communications Commission (FCC) (Federacia Komisiono pri Komunikado) kontrolas amatoran radion en Usono, kaj estas necese akiri koncesion de ili antaŭ povi transsendi. Estas 6 klasoj de koncesioj de amatora radio; ĉiuj postulas skribitajn ekzamenojn kaj scion de la morsa kodo.

La American Radio Relay League (225 Main Street, Newington, Connecticutt 06111) havas lernolibrojn por la FCC-ekzamenoj, kaj aliajn librojn pri la morsa kodo kaj pri kiel iĝi radio-amatoro. Skribu al ili por librolisto.

Redakcio, JEN-Bulteno
ĉe Erik J. Felker
731 Birmingham Road
Burbank, California 91504
U. S. A. -- Usono

PM
6 NOV
1971




FIRST CLASS

ADDRESS CORRECTION REQUESTED